

La eksperimenta instruado de esperanto en la dua eŭropa regiono:
Germanio, Belgio, Francio kaj Nederlando.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 691, 1977.01.05 & 07 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĉiuj esperantistoj jam aŭdis raportojn pri la lerneja eksperimento de ILEI (tio estas Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj), kiu grupigis klasojn el Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio. En la paderborna Internacia Konferenco disvolviĝinta fine de novembro 1976 raportis pri tiu ĉi eksperimento doktoro Istvan Szerdahelyi, kiu nuntempe pretigas la statistikajn raportojn por la instruministerioj kun siaj gestudentoj en Budapeŝto. Ankaŭ pri ĝi parolis du instru-kunlaborintoj : sinjorino Anja Hurčak el Rijeka, Jugoslavio, kaj sinjorino Erzsébet Formaggio el Chiavari, Italio. Kiam eldoniĝos la finrezultoj de la statistikaj analizoj, tiam ni detale raportos pri tiu ĉi grava eksperimento.

A.- Hodiaŭ ni ŝatus diri kelkajn vortojn pri alia eksperimento, kiu nuntempe disvolviĝas en dua eŭropa regiono kaj kiun gvidas sinjoro Helmut Sonnabend el Dollbergen, Germanio, la pezidanto de ILEI. Sub la titolo La Esperanto-instruado en la elementa lernejo sinjoro Helmut Sonnabend faris raporton pri la nuna stato de tiu ĉi eksperimento en la Internacia Konferenco organizita fine de novembro 1976 en Paderborn de Instituto pri Kibernetika Pedagogio. Helpe de notoj, kiujn ni skribis dum tiu ĉi prelego kaj sur la bazo de raporto aperinta en Internacia Pedagogia Revuo, 1976, numero 1, ni alportos al vi hodiaŭ kelkajn sciigojn pri tiu ĉi nova eksperimento.

Cl.- Sinjoro Sonnabend komencis sian raporton ripetante tion, kion nuntempe malkovras analizantoj de la instruprogramoj. La lingva instruado estas sen perspektivo. Ĝia estonteco estas pli kaj pli malhela. Oni konstatas, ke la eklerno de fremda lingvo komenciĝas en netaŭga momento, tio estas, kiam infanoj devus asekuri la parolan kaj skriban asimiladon de la gepatra aŭ lerneja lingvo. Fremdlingvoj kiel la angla, la franca aŭ la germana ne estas en taŭga loko en la elementa instruado, ĉar ili perturbas la asimiladon de la gepatra lingvo. Ĉiuj eksperimentaj analizoj pruvis, ke la sola fremda lingvo, kies instruado estas efektivebla kun pozitivaj rezultoj por ĝi kaj por la gepatra lingvo, estas esperanto. Ĝi ne nur estas instruebla, ankaŭ ĝi estas lernebla almenaŭ kvinfoje pli rapide ol la aliaj fremdaj lingvoj, kun tuja profito por la instruado de la gepatra lingvo, kio neniam okazas kun la instruado de la ceteraj fremdaj lingvoj. Tial la lernejoj aŭtoritatoj kaj la instru-ministerioj ĉiam pli atente ekzamenas novan eksperimentadon rilate al la esperanto-instruado kaj interesiĝas pri la testado kaj analizado de tiuj ĉi eksperimentoj.

A.- En Malalta Sakcio nova leĝo, kiu permesas lerneajn eksperimentojn, favoras priesperantan eksperimentadon. Tuj tri lernejoj decidis profiti pri tiu ĉi nova situacio, ili troviĝas en Peine, Balge kaj Dollbergen. Estis la bazo de nova interlerneja kaj internacia eksperimento, kiu nuntempe tuŝas 11 klasojn elementajn en 5 landoj: Belgio, Francio, Nederlando, Greklando kaj Germanio, grupigante entute 327 gelernantojn.

Cl.- Tiun ĉi eksperimenton partoprenas do 11 geinstruistoj kun siaj gelernantoj kaj science helpas kaj kontrolas 14 profesoroj kaj fakuloj el 6 landoj.

A.- Ĉiu eksperimento devas havi precizajn celojn. Tiu ĉi donu la eblecon studi:

Cl.- la pli bonan lern-efektivigon kaj ekonomion kompare al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj;

A.- kiel sekvon de studado de esperanto pli intensan lernadon de la gepatra lingvo;

Cl.- la pli bonan akceladon de la legkapabla kaj ortografia evoluado ĉe ĉiuj infanoj, sed aparte de tiuj, havantaj ĉi-koncernajn lernproblemojn:

A.- pli bonajn lernŝancojn ĉe la lernado de la aliaj fremdaj lingvoj;

Cl.- kreskantan konscion rilate integriĝon de Eŭropo ĉe ĉiuj partoprenantaj personoj: ĉu lernantoj aŭ instruistoj.

A.- Kiel lernolibro estis elektita ‘Sub la verda standardo’ de Korte, malgraŭ ĝia malnoviĝo rilate al modernaj pedagogiaj konceptoj. Dum unu lerneja jaro la instruado ampleksas 70 horojn, dum kiuj la gelernantoj devas lerni 289 leksemojn, 66 gramemojn, 21 gramatikaĵojn kaj 34 frazelementojn. La tuta lingva materialo estas dividita en 20 lecionoj. Al ĉiu leciono estas aldonita lernceloj, kiuj donas sciencan bazon al la tuta eksperimento kaj permesas fari pertestajn mezuradojn. Ellaboritaj estas entute 134 lernceloj. Ĉiuj demandoj laŭ pedagogiaj, didaktikaj, metodaj kaj organizaj vidpunktoj estis kompilitaj en unu aparta kajero, kiu estas la fundamento de la komuna eksperimento. La testrezultoj jam taŭgas kiel informa materialo ĉe gepatroj, lernejoj, lernejoj kaj ankaŭ por gazetoj.

Cl.- Grava aspekto estas la kontaktoj inter la infanoj. Jam dekomence la infanoj devas havi la senton de solidareco kun la aliaj. Malgrandaj leteroj, desegnaĵoj, fotoj interŝanĝitaj tuj vekis tiun ĉi kunecon. Kaj dum la komenco de la venontaj someraj ferioj okazos en Belgio interlerneja kunveno grupiganta la gelernantojn kaj geinstruistojn. Dank’al subvencioj la partoprenprezo estas ege favora. Dum tiu ĉi aranĝo disvolviĝos instruado en esperanto al miksitaj klasoj kaj sistema testado de la atingitaj rezultoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!